



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 1
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
38-a (43-a) jaro
Monata

Språk og kultur

Foredrag holdt som innledning til diskusjon på Oslo Esperantoklubbs KULTURAFTEN 15/11 1971.

Når jeg i løpet av bare 10 minutter — som er tildelt meg — skal tale om et så omfattende emne som språk og kultur, er det innlysende at jeg ikke kan gi noen grundig analyse av temaet, men bare berøre enkelte sider ved saken.

Det som jeg da vil vurdere, er sammenhengen mellom språk og kultur, og om det internasjonale språket Esperanto kan sies å ha kulturell betydning og således i denne henseende kan sammenlignes med nasjonalspråkene.

Vi vet alle at kulturbegrepet er mangesidig og at det omfatter vesentlige sider ved menneskelivet. En av de beste definisjoner som jeg har hørt om ordet kultur, er denne: «Kultur er menneskets forsøk på å skape ordnede samfunnsforhold». Heri ligger nemlig en erkjennelse av at mennesket lever ikke av brød alene. Det trenger noe mere for å bli lykkelig og for å kunne spre lykke omkring seg. Derfor har kunsten og dens virkemidler, f. eks. maleriet, sangen og musikken og litteraturen en bred plass i kulturlivet.

Slik har det vært fra tidenes morgen. Selv istidsmennesket var i stand til å

meddele seg videre til sine stammefreder ved primitive hjelpemidler. De berømte hulemaleriene fra Frankrike og Spania, som man mener er 20 000 år gamle, er neppe bare et bevis på våre forfedres trang til å utfolde sine iboende kunstneriske evner, men jeg tror dette også var et forsøk på å meddele sine tanker videre til sine medmennesker.

Derfor kan vel både malerikunsten, sangen og musikken og litteraturen — som alle representerer viktige sider ved kulturbegrepet — i virkeligheten betraktes som kommunikasjonsmidler. Kunstnerne ønsker å si noe til oss, og det er opp til oss å forstå hva de mener. —

Det mest betydningsfulle kommunikasjonsmiddel er imidlertid språket — det muntlige og det skriftlige — og jeg mener personlig at språket er den viktigste kulturbærer av alle. Fra urmenneskets gryntelyder og huletegninger gjennom en tusenårig evolusjon via hieroglyfer og billedspråk frem til moderne alfabeter og nasjonalspråk, ser vi at det er språket — ikke minst skriftspråket — som sprer kunnskap om kulturlivets forskjellige si-

der. I det hele tatt gir språkutviklingen et fascinerende bilde på menneskeandens streben henimot større forståelse og dypere innsikt i tilværelsens gåte.

Vi kan derfor trygt slå fast at det er en nær sammenheng mellom språk og kultur, ja de er i virkeligheten uadskiljelige.

Så er spørsmålet her i aften: «Kan det konstruerte språket Esperanto i denne sammenheng sidestilles med nasjonalspråkene og derved kunne sies å være av kulturell betydning?»

Av hensyn til de ikke-esperantister som er tilstede er det nødvendig å si noen få ord om Esperantos konstruksjon og dets rent praktiske forutsetninger vis-à-vis nasjonalspråkene, for hvis ikke dette internasjonale språket kan brukes i praksis på alle de felter hvor nasjonalspråkene anvendes, kan det selvsagt heller ikke ha den kulturelle betydning som nasjonalspråkene har.

Esperanto er basert på latin og de internasjonale fremmedord som går igjen i mange språk, som f. eks. «kontrakto, aparato, kontoristo, radio, maŝino» o.s.v. Alle ord i samme klasse har samme ende-bokstav, substantiver således «o» som vi hørte, adjektiver -a, adverbier -e. Verber i nåtid ender alltid på -as, i fortid -is, i fremtid -os. Flertall -j. Hele grammatikken er på 16 paragrafer med ingen unntagelser. Det er ingen stumme bokstaver, ingen dobbeltbokstaver; betoningen ligger alltid på nestsiste stavelse, og det beste av alt: En bokstav har bare 1 uttale, med andre ord Esperanto er såvidt jeg vet det eneste språk i verden som er 100% fonetisk, idet alle ord uttales nøyaktig slik de skrives. Hertil kommer at et ord har kun 1 betydning og omvendt: Et begrep uttrykkes bare

ved ett ord. Samtidig er det meget nyansert ved et genialt system med for- og ettersavelser. — Kort sagt: Esperanto er meget lett å lære og enkelt å uttale p.g.a. sin vokalrikdom, idet 45% av ordforrådet er vokaler.

En enkel setning som på norsk lyder: «Det internasjonale språket Esperanto er et vakkert og praktisk språk brukt av mennesker i hele verden» vil på Esperanto hete: «La internacia lingvo Esperanto estas bela kaj praktika lingvo uzata de homoj en la tuta mondo.» —

Men hva med utbredelsen? Jo Esperanto er mere utbredt enn folk flest tror. Det internasjonale nøytrale Esperantoforbundet har således offisielle representanter i ca. 3 600 byer og steder spredt over hele kloden, og det er adskillig flere enn noe land har i sitt konsulatvesen. Ved hjelp av disse representanter og en adressebok kan man idag reise verden rundt og være sikker på å få kontakt. Esperantobevegelsen er også yrkesmessig organisert, idet alle de viktigste yrker har en tilsvarende Esperantoorganisasjon hvor man bruker dette språk i sin korrespondanse.

Videre kan nevnes at det utgis ca. 100 aviser og tidsskrifter på Esperanto, og dette språket brukes i regelmessige sendinger fra 23 radiostasjoner. Endelig skal nevnes at Esperanto-litteraturen — såvel skjønnlitteratur som faglitteratur av ethvert slag — allerede er så stor at intet menneske kan overkomme å lese alt som er utgitt på det internasjonale språket, både originalt skrevet og oversettelser fra nasjonalspråkene. Således er alle verdenslitteraturens mesterverker blitt oversatt til Esperanto. Også i poesi og

Daŭr. p. 15.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Nova jaro

Decas, ĉe la komenco de nova jaro, rigardi al la pasinta jaro por

resumi siajn rezultojn. Ordinare oni trovas, ke oni estus povinta pli fari. La sukceso ne estas vere brilega.

Decas ankaŭ rigardi antaŭen. Kaj la problemo ESTOS estas multe pli valora ol la problemo ESTUS POVINTA, kaj samtempe kiel vivfilozofio multe pli fruktdona.

Jen la redaktoraĵoj pensoj komence de januaro. La redaktoroj ne volas aldoni moralajn parolojn al ĉi tiuj pensoj, ĉar ĉiu el ni scias eltiri la esencan konkludon.

Feliĉan novan jaron!

*

SCIIGOJ DE N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado, ni varme petas vin tuj pagi vian kotizon. — La *rektaĵaj membroj* bonvolu sendi sian kotizon (kr. 25,00, familianoj kr. 10,00, junuloj kr. 10,00) al N.E.L., Boks 942, Oslo 1 (poŝtgirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi al la kluba kasisto. Kaj al la klubaj kasistoj ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1972, kaj sendi liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj laŭeble baldaŭ. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L.; la kotizo estas kr. 35,00 por unu jaro. Klubanoj fariĝas subtenantaj membroj pagante kr. 15,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas ne-esperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

57a *Universala Kongreso de Esperanto* okazos en Portland, Oregon, Usono, 29. Julio — 5 Aŭgusto 1972. Pri la eŭropa komuna flugkaravano vidu la Decembran cirkuleron de N.E.L.; cetera ĉiujn informojn donas kaj aliĝojn akceptas Turisma Servo de N.E.L. (s.ino Kirsten Ek, Otto Ruges vei 66, 1345 *Østerås*, poŝtgirokonto 100.32).

La *kontorfondaĵo* en 1971 ricevis malpli multe da donacoj ol en la antaŭa jaro, sed la oficejo estas same necesa, kiel pli frue! Ni tial permesas al ni memorigi pri tiu grava donac-fondaĵo. Ĉiu donaco estas tre valora helpo por la ekonomio de N.E.L.

La *propagandannda fondaĵoj ankaŭ* en 1971 oni evidente preskaŭ tute forgesis, ĉar ĝi ricevis nur tre malmultajn donacojn. Tiu fondaĵo i. a. permesas al ni eldoni propagandmaterialon, subvencii prelegvojaĝojn k.t.p. Ni tial permesas al ni memorigi la membrojn ankaŭ pri tiu grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. — *Februaro.* La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poŝtgirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Marto. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon.

Raporton de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj, kaj oni sendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri donacabonoj al Norvega Esperantisto kaj pri laboro ĉe la junularaj organizaĵoj). Oni pretigis la gazetan kurson ankaŭ por ofsetpresataj gazetoj. Oni pristudis diversajn proponojn pri monokolektado kaj decidis starigi la Kampanjon Rejsæter (vidu aliloke en ĉi tiu n.ro). La Junulara Sekcio elsendis cirkuleron pri la laboro ĉe Junularaj organizaĵoj, laŭ la rezolucioj de la landa kongreso. Oni transsendis al U.E.A. la opiniesprimon de la landa kongreso pri la kotizo de la Universalaj Kongresoj. Oni bedaŭras ke pro miskompreno ne aperis raporto en Norvega Esperantisto pri la 56a U.K. en Londono. Oni proponis al la Norvega Radio havigi kaj prezenti la TELEAC-kurson de Esperanto. Ĉar la ricevataj kotizoj efektive povas kovri nur 6 n.rojn de Norvega Esperantisto jare, oni decidis de 1972 transiri al regula 2-monata eldono de la revuo (6 n.roj jare).

La Liga Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono.

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Decembro 1971 superan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Stefan Murak, elementan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Wenche Eng kaj Ivar Gudmundsen.

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1972. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Majo*. Personoj, kiu faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skjemojn. *Plenigu la skemojn akurate kaj komplet!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono,
Boks 942, Oslo 1. Poŝtgirokonto 100.34.

BERGEN: S.ro Kjell Offerdal,
Sv. Hjetlands vei 6 B,
5031 *Laksevåg*.

HAUGESUND: S.ro Olav Thor-
modsen, Boks 59,

5501 *Haugesund*.

SARPSBORG: S.ro Johan Ham-
mond Rosbach, Huldervn. 17 B,
1700 *Sarpsborg*.

SAUDA: S.ino Elna Matland,
Brekkevn. 50, 4200 *Sauda*.

TRONDHEJMO: S.ro Erling
Anker Haugen, Sig. Bergs allé
12, 7000 *Trondhejmo*.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. *Stop-Bowitz*
prezidanto.

Subtenantaj membroj 1971

Steffen Kjetland
O. J. Rønnevig.

Subtenantaj membroj 1972

Peder Hillestad
Harald Andreassen
Ruth Berntsen
Otto Hjertaas
Anny Somdalen.

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue	kr. 1 033,00
G. S. Braut	» 10,00
Valborg Malling	» 40,00
R. Bugge-Paulsen ..	» 60,00
C. S. B.	» 20,00
H. Danielsen	» 15,00
Anonima	» 48,00
Julie Romsdal	» 8,00
J. Berggreen	» 22,35
A. & G. Høibo	» 5,00
Ruth Berntsen	» 15,00
Leif Belle	» 75,00
Anny Somdalen	» 5,00

kr. 1 356,35

KAMPANJO REISÆTER

En n.ro 9/10 1971 Elna Matland
alvokis ke minimume 100 membroj

anoncu sin por pagi 100 kronojn jare dum 3 jaroj por starigi kapitalon de 30 000 kronoj kiel financon bazon por la norvega Esperanto-movado. La estraro decidis nomi la kampanjon laŭ la patro de la ideo: Kampanjo Reisæter. Sube ni kvitancas la unuajn 4 donacojn. Kontribuantojn oni povas sendi al la ordinara poŝtĝirokonto de N.E.L.: 100.30.

Elna Matland	kr. 100,00
Trygve Reisæter	» 100,00
R. Bugge-Paulsen	» 100,00
Ingvald Dahl	» 100,00

		kr. 400,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

ESPERANTO ESTAS FACILE LERNEBLA!

Dum la aŭtuno 1971 mi gvidis kurson por komencantoj por la Studenta Esperanto-Societo. Mi uzis la Cseh-metodon, kaj laŭ ĝi oni post la 7a aŭ 8a leciono petas la kursanojn verki «romanon». Unu el miaj kursaninoj, stud. de filologio Åsta Norheim, verkis la suban «romanon», kiu klare montras kiel rapide kaj facile oni lernas esprimi sin en la internacia lingvo.

C. Stop-Bowitz.

Juna instruistino amas.

Romano verkita de Cseh-metoda kursanino Åsta Norheim.

Lise estas juna fraŭlino. Ŝi estas malalta kaj bela. Ŝiaj haroj estas

nigraj kaj ŝiaj okuloj estas brunaj. Lise estas tre romantika persono. Ŝi amas ruĝajn rozojn, romanojn, belan muzikon, ĉokoladon, Per kaj malgrandajn katojn.

Lise estas instruistino. En la mateno ŝi estas tre laca, sed la horloĝo montras la novan labortagon. Ŝi levas sin kaj vestas sin kaj lavas siajn du katojn, Tass kaj Tuss. Tass estas nigra kaj pli malgranda ol la griza kaj blanka Tuss. Post la matenlavo Lise faras matenmanĝon. Ŝi tranĉas panon per la tranĉilo, kaj Lise kaj la katoj manĝas buterpanojn.

En la lernejo Lise instruas matematikon, geografion kaj lingvon. La lernantoj aŭskultas, ĉar Lise estas interesa instruistino. Ŝi metas Tuss kaj Tass sur la tablon antaŭ la tabulo. Tie ili sidas kaj rigardas la lernantojn per siaj verdaj okuloj.

Post la tagmanĝo Lise legas la frazojn, kiujn la lernantoj skribis al ŝi. En la vespero ŝi legas romanojn kaj ŝi ploras, ĉar ŝi havas tre molan koron. Lise amas Per, la plej bonan, belan kaj fortan instruiston en la mondo. Lise skribas al li longajn leterojn. Ŝi skribas ke ŝiaj katoj estas sanaj kaj havas grandan apetiton.

Sed unu tagon Lise ricevas leteron de Per. Li skribas mallongan leteron: «Vi ne amas min, vi amas viajn katojn! Mi donas al vi vian portreton.» En la koverto estas la portreto de Lise. — Lise estas malfeliĉa. «Kial, kial —» ŝi dandas la katojn, «mi amas vin kaj lin!»

*

La 45a Kongreso de S.A.T.

La 45a Kongreso de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos de la 22.—29. julio 1972 en KUOPIO (Finnlando). Informojn petu al: «Lingvoponto», Pf 119, 70101 KUOPIO 19, Finnlando.

La 27a Kongreso de SAT-Amikaro (Laborista organizo por franc-lingvaj teritorioj) okazos en Narbonne, Francio, de 2.—4. aprilo 1972. — Informoj ĉe P. LOUBIC, «Verda Stelo», Route de Carcassonne, 11 — NARBONNE, Francio.

SOLIDARECO INTER-ESPERANTISTA

Esperantistoj konas nek lingvajn, nek naciajn barojn. Ilia homa solidarsento povas esprimiĝi en tre variaj formoj. Unu estas tiu havigi al amiko-korespondanto, kiu ne povas pagi eksteren, avide sopiratan Esperantan libron.

Tia libro estas la 1344-paĝa volumego

PLENA ILUSTRITA VORTARO de ESPERANTO

La eldoninto decidis en tiaj donac-kazoj lasi la verkon por la favorprezo, kiun ĝuis la antaŭmendintoj, nome *US \$ 19* inkludite.

KIEL MI FARIĜIS «KOTA HOMO». NOKTO DE TERURO INTER KAPĈASISTOJ. AMO KAJ ANTIAMO EN NOVGVINEO

Jen nur tri el la dek titoloj sub kiuj aperos en la proksimaj dek numeroj de «Esperanto Gazeto» artikoloj de Tibor Sekelj pri lia ĵusa esplorojojaĝo tra Novgvineo.

Krom ili vi trovos en E. G. la kutimajn stimulaĵajn artikolojn kaj interesaĵojn el la movado kaj la mondo. Ankaŭ la originala Esperanto—bonhumoro ne mankos, kiel la jam famiĝintaj «Leteroj al la redakcio».

Abonprezo: por 1972: kr. 17,50. Fruaj abonantoj ricevos senpage la decembran numeron.

Peranto: Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S), Box 942, OSLO 1, Poŝtĝirokonto 100.31.



ESPERANTO GAZETO

De Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto

zive registritan afrankon. Kompreneble temas nur pri mendoj por personoj loĝantaj en la zono de nepagipovaj landoj! Alie la prezo estas £ 26.10 (inkl. registr. afrankon).

Oni sin turnu al S.A.T., 67 Avenue Gambetta, Paris-20, poŝtkonto 1234.22 Paris aŭ poŝtk. Zürich 80 200 49.

La aŭtunaj Esperanto-kursoj en Århus

La kursojn, kiuj okazis de la 17a ĝis la 23a de Oktobro, partoprenis tridek personoj inkludante instruistojn. Estis po unu el Indonezio, Italujo kaj Norvegujo, du el Nederlando, tri el Germanujo kaj la ceteraj en Danlando kaj Svedujo.

Oni aranĝis kvar kursojn sed nur tri grupojn, ĉar la unua kaj la kvara kursoj, por komencantoj kaj instruistoj, estis kune.

Tiamaniere la estontaj instruistoj lernis la instruadon.

Mi migris (ne tro populara maniero) de kurso al kurso kaj partoprenis en ĉiu minimume unu fojon. La instruistoj uzas iom diversajn metodojn, sed ĉie oni instigas al diskuto kaj aktiveco. La aktiveco, plej ofte estas, ni diru, modesta,

sed ne mankas ankaŭ viglaj kontribuoj.

Por mi, tamen, plej valoraj estis la posttagmezaj ekskursoj kaj vesperaj kunvenoj. Tiam torentis la Esperanta lingvo de ĉiuj flankoj kaj estis necese uzi ĝin. «Krokodilado» preskaŭ ne ekzistis. La lokaj esperantistoj vizitis nin ofte, kaj unu vesperon invitis nin en siajn hejmojn. Treege bona ideo.

Ke ekestis amikeco kaj interkursanoj mem kaj interkursanoj kaj lokaj esperantistoj, ne estas dubo. Ni longe memoros tiun semajnon.

Loĝejo kaj manĝaĵo estis luksa, La vetero terura.

Raportas *Stefan Murak*.

Pro la vojaĝrakonto de OTTO PRYTZ

Kun intereso mi legis pri via aventuro inter Sofio kaj via hejmo. Ankaŭ ni havis similan aventuron.

Ni estis finna karavano de 10 aŭ 12 personoj. Sufiĉe frue ni konstatis, ke nia vagonaro eliras el Sofio antaŭ la fermo de la kongreso, kaj tial ni sufiĉe frue informiĝis pri la horaro. Ni ricevis en la Kongresa oficejo informon,

ke estas rezervita en la koncerna vagonaro por kongresanoj unu vagono, kiu rekte veturas ĝis Zagreb, kiun ĝi atingos en la vespero. Sed kiam ni alvenis al Beograd, ĉiuj vojaĝantoj lasis la vagonojn kaj ni maltrankviliĝis — feliĉe, ĉar evidentiĝis, ke tiu vagonaro daŭrigos al Varsovio. (Parenteze: ne sciante la landan lingvon ni montris al la vagono kaj diris al la

Daŭr. p. 10.

Kiel fartas la floretoj?

Kiel fartas la floreto
kiun hieraŭ vespere
mi pentris
sur cia brusto,
apud koro cia,
kun tremetanta
mano
el kio forte
elfluis
emocio mia?
Kiel fartas la floretoj,
ruĝa kaj viola,
kiujn poste
pli kuraĝe
mi pentris sur la
ebeno
de la postaĵo cia?
Ho kiel mi
amas
la postaĵon cian
kun la du floroj,
ruĝa kaj viola,
naskitaj de mia
koro,
de la amo mia!

Kiel fartas la floreto
plus la du
floretoj
entute tri
floretoj?
Mi kisas la
floretojn
sur la brusto cia
sur la postaĵo cia
kaj multajn
aliajn floretojn
mi pentros
sur la belkorpo cia.
Ĉia korpo estas
ĝardeno
de la revoj miaj,

cia korpo estas
haveno
de mia kompleta amo.
Ne lasu min, kareta,
estu por ĉiam mia
kun la postaĵo cia!

Alvdal, 24.8.71
Lina Gabrielli

Al virinoj

Virinoj, «fontoj», de l'amo
sur nia tero loĝantaj,
konsciu: plej dolĉan amon
minacas agresoj konstantaj
frida minacas milito
psikologia nomata

flama minacas milito
de popol' anatmata.

Ĉe agres' nin haltigante
vi povus multege fari,
subtile kun ni traktante,
nin virojn vi provu ravi.
Vi «fontoj» tute konsciu
segregacion forigi;
justeco el vi radiu,
por virojn viajn nobligi.

Konstante se tiaj estus
virinoj de ĉiuj rasoj,
eble ni ĉie ho festus
liberon de popolamasoj.
Grabareviĉ Bogoljub

Lejka

Nigra
kaj svelta,
dolĉa
kaj ludema,
ĉi ŝajnas
penraĵo
ho, Lejka mia,
kiam ci kuras
sur la molaj

herboj
de la vasta
bieno.
Ci kapriolas,
kiam li,
la amato mia
vokas cin nome.
Ci akompanas
lin
al la laboro
kaj lekas
la karesantan
manon
rigardante per
grandaj okuloj,
en kiuj
preskaŭ brilas
larmo
de amo.
Ho, Lejka,
estu ĉiam tiel
ĉarma
en la memoro mia!

Alvdal, 31.8.1971.

Lina Gabrielli

Pro la... daŭr. de p. 8

fervoja oficisto: «Zagreb». Li signis per kapo, movante ĝin vertikale, kion ni kopmrenis «jes», kaj sekve ni restis. Nur ĉe dua informiĝo ni eksciis, ke la vagonaro ne iros al Zagreb. Kaj iu instruis al ni, ke la jeso okazas ĉi tie per horizontala movo de la kapo!).

Fine ni do sidis en vagono, kiu veturos al Zagreb, sed montriĝis, ke ĝi ne estas rapidvagonaro — ni alvenis matene, kun almenaŭ 10-hora malfruiĝo. Feliĉe ni rezervis al ni dutagan restadon tie. Kaj kun plena konfido ni venis post du tagoj al la stacidono por eniri en

rapidvagonaron por Munkeno. Tie ĝi devis alveni je la 22a horo, kaj ni havis dormvagonojn menditajn por veturo ĝis Hamburgo, en vagonaro, kiu eliros ĉ. la 23a. La veturado estis bela, sed — malrapida.

Kiam estis jam preskaŭ la 22a horo, ni demandis de la konduktoro (ĉar restis ankoraŭ granda spaco inter ni kaj Munkeno), kio nun okazos: ĉu la nokta vagonaro atendos nin?, li respondis: se ni malfruiĝos, oni certe aranĝos por vi ekstran vagonaron. En Munkeno, kiam ni alvenis je la 2a horo nokte, li fuĝis antaŭ ni kiuj volis aŭdi, kie eliros la ekstra vagonaro. Nu, ni serĉis por ni tranoktejon laŭ nia plej bona kapablo, kaj restis en Munkeno ĝis la tagmezo. Tiam fine ni povis ekveturi en la direkto al Hamburgo, por kiu ni estis rezervintaj unu tagon. Sed tiun tagon ni nun pasigis en la vagonaro, kaj rekte ni devis daŭrigi ĝis Kopenhago. Nome ni havis rezervitajn kajutojn en la Finnlanda ŝipo, kiun ni apenaŭ sed tamen senmanke atingis, oferinte la restadon en Hamburgo. Mi ne povas eĉ imagi, kia sorto estus nin trafinta, se ni ne estus havintaj tiun rezervon por oferi. La ŝipoj ja veturas nur dufoje en semajno, kaj aŭtune ili estas komplete abonitaj por finnoj revenantaj el eksterlando.

Se do iu ankoraŭ ne kredas je via historio, vi povas respondi, ke vi ne estis la sola aventuristo, kaj aludi al nia sperto.

Vilho Setälä.

57-a universala kongreso de Esperanto Portland (Oregon), 29.7. - 5.8. 1972

Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon
Konstanta Adreso: Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando
Kotiztarifo post la 31a de decembro 1971

	gld	\$
1. Kongresano ne membro individua de UEA	110,—	30,80
2. Kongresano individua membro kun Jarlibro (MJ)	95,—	26,60
3. Kongresano individua membro kun Jarlibro kaj revuo «Esperanto» (MA)	80,—	22,40
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	77,—	21,60
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	66,50	18,60
6. Junulo ĝis inkl. 20-jara	33,—	9,30
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara	55,—	15,40
8. Blindulo	44,—	12,30

Por la limdatoj validas la dato de la pago.

Usonaj, kanadaj, eventuale aliaj elamerikaj kaj eĉ japanaj esperantistoj prefere sendu sian kongresaliĝon kaj la monon rekte al la LKK de la 57-a Universala Kongreso de Esperanto, 12946 N.E.Hancock St., Portland, Oregon 97230, Usono.

Unuaj simbolaj aliĝoj

Kvar britoj, unu nederlandano kaj unu japano sendis sian kontribuon por simbola aliĝo kaj tiel manifestis moralan kaj financan subtenon al la 57-a UK en Portland, Oregon 1972. La nomoj de ĉiuj simbolaj aliĝintoj estos enskribitaj en la Kongresa Libro 1972 kaj ili ricevos ĉiujn presaĵojn de la Kongreso. Minimuma kontribuo por simbola aliĝo estas 30,— gld aŭ ekvivalento.

Monda turismo kaj lingva diverseco

Por la kongresa ĉeftemo de la

57-a UK, la Estraro de UEA elektis «Monda turismo kaj lingva diverseco». La celo estas i.a. pritrakti dum la Ĝenerala Kunveno la temon sub aspektoj de historia evoluo, ekonomia signifo, atingoj de la Esperanto-movado sur kampo de turismo kaj la perspektivoj por estonta agado.

Kongresa Debato

Pedagoga temo elektiĝis por la Debato en Portland: «La valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj».

Oratori estas arto

Jenaj temoj atendas junajn homojn ĝis 28-jaraj en la Oratora Konkursito 1972:

1. Turismo kaj konservado de la naturo.
2. Kiel atingi, ke turismo efike kontribuu al kulturaj interŝanĝoj?
3. Esperanto kaj la moderna junularo.

En la tria temo la oratoro povas libere pritrakti iun ajn aspekton laŭ propra elekto. Premioj: 100,—, 70,— kaj 40,— guldenoj.

Lingvaj ekzamenoj

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidat-ojn okaze de la Universala Kongreso. Ĉiu, kiu deziras informiĝi skribu al la sekretario d-ro J. C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S. W. 19, Britujo. La limdato estas la 1-a de majo 1972.

Statistiko (29. novembro 1971)

Argentino 2, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 2, Belgujo 4, Brazilo 4, Britujo 11, Bulgarujo 9, Ĉeĥoslovakio 3, Danlando 4, Finnlando 9, Francujo 27, F. R. Germanujo 19, Grekujo 3, Hispanujo 4, Hungarujo 5, Israelo 1, Italujo 11, Japanujo 15, Jugoslavio 6, Kanado 13, D. R. Kongo 2, Koreo 3, Madagaskaro 1, Meksiko 3, Nederlando 26, Norvegujo 5, New Zealando 3, Peruo

1, Pollando 6, Portugalujo 1, Svedujo 17, Svislando 7, UAR 2, Usono 71, Venezuelo 1.

Entute aliĝis 305 personoj el 35 landoj.

PROSPEKTO PRI GOTENBURGO

Okaze de la urba jubileo, Inter-Agadgrupo por Esperanto eldonis, kunlabore kun Turist-rafika Asocio de Okcidenta Marbordo, Gotenburgo, tre belan kaj tre plaĉan faldprospekton pri la urbo.

La preso kaj la koloroj estas netaj kaj klaraj, kaj la tuta presaĵo atestas pri solideco. La bildoj estas bone elektitaj, la kvar mapoj — i.a. urboplano kaj mapo pri la marbordo de Halden ĝis Skåne — estas modelaj. La tekstoj estas mallongaj kaj sufiĉaj. Ni proponas, ke vi petu la eksterordinare sukcesan prospekton ĉe Väst kustens Turisttrafikförbund, Parkgatan 2, S-411 38 Göteborg.

Per mopedo de Arendal al Tromsø.

Kiel dum la jaroj 1967 kaj 1968 mi deziris viziti mian hejmurbon Tromsø ankaŭ dum la somero 1971 por vagado en la montaro kaj fiŝkaptado en la multaj lagetoj tie.

Jam aŭtune 1970 mi pripensis la vojaĝmanieron, kaj iun tagon mi subite ekvidis mopedon starante en vendejo; mi eniris kaj demandis pri la prezo; la prezo estis akceptata kaj mi aĉetis ĝin, veturilon mi neniam antaŭe uzis.

La 14-an de junio mi ekveturis de Arendal laŭ longe E18 al Brevik, kie mi ĝuis bonan meztagmanĝon, antaŭ ol mi veturis pluen tra Porsgrunn — Gjerpen — Hvittingfoss al Hønefoss, kie mi haltis por tranokto. La sekvantan tagon la vojaĝo iris laŭlonge de la okcidenta flanko de Tyrifjorden kaj la orienta flanko de Randsfjorden tra Dokka supren tra Etnedal preter Rust, Stølen Fjellstue kaj al la dometo de mia filo, kiu situas en

la ĉirkaŭaĵo de Leningen. La vetero kaj la naturo estis tre belaj, kaj mi gaje ĝuis ĉion. Mi estis sola, kaj post la longa tago mi dormis tre bone, ĝis mi tre frue vekigis pro kafosopiro. La kafokaldrono estis rapide metata sur la gasoaparaton kaj kelkajn minutojn mi ĝuis mian fruan matenmanĝon kun bona kafo. Antaŭtagmeze mi iris al Leningen Fjellstue, kie mi aĉetis fiŝkaptkarton necesan en la ĉirkaŭaĵo de Leningen; samtempe mi atingis grandan favoron de juna belulino, kiu absolute volis iri kun mi, sed tio ne estis oportuna por mi. Tial mi prenis ĝin ĉe la kolĉeno kaj kondukis ĝin al la posedantoj. Tre bela alkhundo!

Dum la posttagmezo la vetero malboniĝis, komencis plui, neĝi, kaj ankaŭ hajloj falis, krom tio forta vento blovdadis, tiel ke mi devis resti en la dometo ĝis vendredtagmeze, kiam la vetero iom pliboniĝis. Posttagmeze mia filo kun edzino kaj siaj gebopatroj venis al la dometo. Tial mi sabate povis iri por fiŝkapti. La rezulto estis, ke ni manĝis kuiritan trutojn tagmeze, kaj ke mi ankaŭ manĝis rostitan truton diamanĉon matene, antaŭ ol mi forlasis Leningen kaj veturis pluen preter Kittelsbu, Forsetsætra, kaj Værkels Kafé, kie aliflanke de la vojo troviĝas kolono kun kupra plato, sur kiu estas linoj montrantaj al la diversaj montpintoj en la ĉirkaŭaĵo. La akutangula vojo malsupren de la okcidentmonto de Gausdal estas longa kaj malfacila veturi. Tial mi tre singarde veturis malsupren al Ves-


tre Gausdal kaj Segelstad Bru. La elvido estis bona kaj la pejzaĝo belega. La vojo pluen iris tra Brusvea kaj Tretten, kaj je Rankleiv mi prenis la vojon sur E6 al Ringebu, kie mi tranoktis en Skjæggestad Camping. London mi forlasis Ringebu kaj veturis tra Sør-Fron, Otta, Dombås, Dovre kaj Oppdal al Solly Camping, kie mi haltis por la nokto. La vetero, kiu dum la pasinta tago estis iom malbona, hodiaŭ estis tre bela, kaj mi venis al Trondheim je la 11.30a, kiam la milita orkestro ludis. Ĉu estis pro mia alevno al la urbo, aŭ ne, mi ne scias, sed mi ne kredas. Tie mi vizitis bonajn amikojn de Harstad kaj restis ĉe ili ĝis merkredo antaŭtagmeze, kiam mi forlasis Trondheim, traveturis Stjørdal kaj Steinkjer al Øvre Kvam, ĉe Snåsavnet. La vetero estis griza dum la tuta tago, kaj mi haltis tie por la nokto. Jaŭdon mi daŭriĝis mian veturadon preter Trofors kaj luis al mi ĉambbron, ĉar la vetero ne plaĉis al mi. Vendrede mi vekigis, la suno brilis kaj mi tre feliĉe veturis pluen, pasis Korgfjell kun ĝia impona elvido, tra Korgen, preter Laksfoss, Fineidfjord kun ĝia margarinfabrika, al Andfiskå (ankaŭ nomata Åga) ĉe Mo i Rana. Tie mi ankaŭ havas amikojn, kiujn mi vizitis, kaj mi restis ĉe ili ĝis dimanĉo matene. La veturado daŭris, la suno brilis, kaj estis varma la aero, kaj mi trapasis Dunderlandsdalen, trans Hjertåsen, preter Stødi (la plej alta fervojpunkto sur Salt-

Daŭr. p. 16.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



Iom pri la fervojlinioj en Norvegio LA SØRLANDSLINIO

de Oslo okcidenten al Stavanger ĉe la marbordo estas 599 km. longa, kaj de ĝi iras kelkaj flanklinioj, ekzemple norden al Notodden kaj suden al kelkaj urboj kaj urbetoj situantaj laŭ la bordo, sed ĝin ni neniam vidas, ĉar la linio iras enlande tra montareca arbartereno kun riveroj, lagetoj, marĉdistancoj kaj dise situantaj kampardistriktoj.

Unue ni mallongdistance vojaĝas laŭ la Oslofjordo kaj post iom da suprenvojaĝo ni ĝuas belan panoramon super la Liervalo antaŭ ol ni malsuprenvojaĝas al Drammen kaj poste laŭ la rivero Drammenselva tra miksaĵo de industri- kaj kampardistriktoj. Post pasado de Hokksund ni ekvidas la lagojn Fiskumvatnet kaj Eikeren kaj la malnovan preĝejon Olavskirken konstruitan iom post la jaro 1200. Ĉe Skollenborg aperas la altaj Skrimmontaroj, kaj ni venas al Kongsberg, konata pro siaj arĝentminejoj kaj la 250-jaraĝa preĝejo. Poste ni suprenvojaĝas kaj venas en 1745 m. longan tunelon kaj poste ni renkontas la monumentecan naturon de la gubernio Telemark. Ni vidas la montojn Gaustad, Himing kaj Lifjell kaj la lagon Heddalsvatnet. Okcidente de Neslandsvatn ni post transvojaĝo de belaj Telemarkkampar-distriktoj venas en Aust-Agder gubernion, kaj sur altaj pontoj ni transvojaĝas la riverojn

Trollelva kaj Gjerstadelva. Post pasado de la akvofalo Herefoss kaj la 15 km. longa lago Oggevatn ni venas al Kristiansand, konstruita en la jaro 1641 laŭ la planoj de la tiama reĝo Christian IV. Ni nun estas en Vest-Agder gubernio, kaj la urbo estas la komerccentro de la landparto Sørlandet kaj la sidejo de la administracio de la gubernio Vest-Agder. Kun siaj rektaj kaj larĝaj stratoj ĝi malsimilas al la aliaj norvegaj urboj. Pluen okcidenten la Sørlandslinio transversiras vicon da norden-suden-direkte situantaj valoj. Ĝis Audnedal la linio iras tra la malaltaj montodorsoj inter la valegoj kaj poste pluen okcidenten tra kelkaj el la plej longaj fervojtuneloj de Norvegio i.a. la 8,5 km. longa Hægebostadtunelo, kaj elvenante de ĝi ni tiuj vojaĝas en la 9064 m. longan Kvinesheitunelon kiu estas la plej longa en Norvegujo kaj tra la 6 km. longa Gylandtunelo kaj tra 3 km. longa tunelo.

Nun ni venas al la montareca kaj malfekunda pejzaĝo Dalane, «kreita pere de la kolero de Dio», kiel esprimis sin la famkonata pastro Peder Claussøn Friis. Post pasado de Egersund, famkonata ekde foraj tempoj kiel kunvena haveno, ni travojaĝas Jæren kun grandioza, vasta, ondanta pejzaĝo kaj kun la maro ekstere kaj la malaltaj montodorsoj interne.

Laŭ la fjordo ni nun vojaĝas al la finpunkto de la Sørlandslinio, Stavanger. La

urbo fondiĝis jam proksimume en la jaro 1125 kaj estas hodiaŭ, kun siaj iom pli ol 75 000 enloĝantoj, vigla komerc-, martrafikad- kaj industricentro en Rogaland. Ni estas en la gubernio Rogaland. La urbetoj ĉi tie atestas pri la agemo de la rogalandanoj. Ĉi tie estas grava industrio.

Språk og... daŭr. de p. 2

dramatisk diktning såvel som i sangkunst er Esperanto meget anvendelig. —

Vi esperantister hevder derfor at Esperanto tåler en sammenligning med nasjonalspråkene på alle områder og derfor må kunne sies å være en kulturformidler.

I denne forbindelse vil jeg vise til et oppsiktsvekkende intervju som Aftenposten refererte den 19. oktober i år med vesttyskeren Heinrich Böll, som er den nye formannen for PEN-International — den internasjonale forfatterforening.

Her uttaler han følgende: «Som nylagt formann i PEN-International ser jeg ingen hensikt i at organisasjonen skal diskutere litterære spørsmål. Det jeg ønsker — og jeg vet ikke om jeg vil lykkes — er å skape en form for internasjonalt som motvekt mot det jeg vil kalle språk-imperialisme, de tallrike nasjoners kulturelle overvekt over de små. Språkimperialisme fører ofte til at de større folk blir holdt i uvitenhet om små nasjoners kultur.» —

Dette var sterke ord, men helt i tråd med det som vi esperantister lenge har hevdet. Dessuten er det et faktum at de små nasjonalspråkene nå blir så oppblandet med de store nasjoners språk — særlig engelsk — at dette betyr en stor kulturell fare for de små nasjoner.

Vi esperantister tror heller ikke på teorien om at ett av nasjonalspråkene i overskuelig fremtid vil makte å bli et fel-

les verdensspråk. Jeg vil her peke på to momenter som underbygger denne oppfatning:

1. Den nasjonale prestisje er for stor. Konkurrentene vil ikke tillate at ett spesielt nasjonalspråk skulle få denne privilegerte stilling.
1. Samtlige nasjonalspråk er for vanskelige å lære — både av grammatikalske og fonetiske grunner — for de andre folkeslagenes brede masser.

Til gjengjeld tilbyr vi esperantister det moderne samfunn et felles kommunikasjonsmiddel, et helt nøytralt og lettært språk som ikke vil fortrenge noe nasjonalspråk, men som er ment som det *annet* språk for alle nest etter nasjonalspråket.

Dette vil kunne bety løsningen på språkvirvaret som idag hersker rundt om på kloden, ikke minst blant FN's 131 medlemsland. Esperanto vil kunne bli det mellomfolkelige kontaktspråket som vi idag så sårt trenger i vår urolige verden.

At dette i så fall også ville få stor kulturell betydning burde være innlysende.

John Berggreen

Gen.sekr. i Norsk Esperanto-Forbund

MEMORU NIAJN SAKETOJN

Ni daŭre vendas pm. Ĉu vi forgesis? Dum kelka tempo neniu plu mendas, malgraŭ la premiaj ŝancoj. Kaj malgraŭ ĉi fako, ke oni per aĉeto helpas sian Esperanto-gazeton. Memoru ankaŭ, ke vi povas aĉeti bildpoŝtmarkojn por ĉia sumo de 5 ĝis 1000 kronoj. *Nun ni povas ankaŭ liveri pakaĵojn, kiujn vi pagu laŭ la nombro da pm en la pakaĵoj; prezo: 20 øre por unu pm.* Mendu kaj pagu ĉe la redakcio en Sarpsborg! Sendu nenion koncerne poŝtmarkojn rekte al Oslo!

*

Per mopedo de... daŭr. de p. 12

fjellet) kaj subite mi estis sur la senarba monto. Forta kaj malvarma vento blovis, kaj mi sentis la malvarmon, tial mi plejeble rapide envadis la kafejon ĉe La Polusa Cirklo, por havigi al mi tre varmekan kafon, nur tason, ne la tuton. Ekstere de la kafejo staris multaj aŭtomobiloj plejparte eksterlandaj, nur du kun norvegoj.

La eksterlandanoj absolute devis fotografi la Signon de la Polusa Cirklo, kaj ili svarmis ĉirakŭ la signo preskaŭ kiel muŝoj ĉirkaŭ taso da siropo. Post la kafotrinkado mi plejeble rapidis malsupren en la valo de Saltdalen, trapasis Rognan (malnova boatkonstruejo), Finneid (eksporthaveno de Sulitjelma), Faŭske (marmorrompejo de Ankerske), Bonåssjøen al Mørvikbotten, kie mi tranoktis. Ambaŭflanke de Saltfjellet la vetero estis bona, kaj mi ĝuis la veturadon. Inter Trengsel Bro kaj Sommerset oni devas trairi 5 tunelojn, el kiuj la plej longa havas 2,7 kilometrojn. Ili estis tre malbone lumigataj. Tial ili estas tre malfacilaj trairi. Lunde la veturado iris tra Innhavet al Bones, do tra la konata Hamarøy de Knut Hamsun. De Bones mi vojaĝis per la pramo al Lødingen, ĉar mi deziris viziti miajn amikojn en Harstad, kien mi venis vespere je la 22-a. Tie mi okupis min ĝis vendredo matene, kiam mi vojaĝis per la rapida ŝipo al Tromsø.

En Harstad mi ne renkontis iun el miaj esperantoamikoj, bedaŭr-

inde, sed en Tromsø mi renkontis la sinjorojn Lars Baardsen kaj Johan Eilertsen. Jes, nun mi atingis Tromsø en bonordo, kaj havis nur 23 kilometrojn, antaŭ ol mi povis iri almonte. Fine mi permesas al mi peti pardonon ĉar mi ne serĉis gesamideanojn en la lokoj, kiujn mi traveturadis.

Saluton

Saxer J. Ebeltoft.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro **133.29**

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar